Manfredo Ratislavo,

# Dormu, mia infanet'

Dormu, mia infanet'!
Gardos vin la anĝelet',
Amas vin la kara Di',
Dormu, sonĝu dolĉe vi!

Malleviĝis jam la sun',
Lumas la duona lun',
Staras alte ĉe l' ciel'
Ankaŭ la vespera stel'.

Kaj se volos nia Di',
Morgaŭ revekiĝos vi,
Levos ree sin la sun'.
Dormu, sonĝu dolĉe nun!

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04), publikigita 1990.*

*Arg-561-1133 (2010-09-19 10:10:21)*

*Mi, Manfred Retzlaff, verkis tiun kiel endormigan kanton por miaj infanoj. Ĝi estas kantebla laŭ iu rusa aŭ siberia melodio, kiun mi iam aŭdis en Radio Moskvo.*